# ATEISMO

REVUO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO








## Protestoj kontraŭ agresado: kiel agadu ateistoj?

**Novembro 2025**

N-ro 41 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

Jen la 20a numero de *Ateismo* dum mia redaktora periodo. Espereble la legantoj, speciale tiuj, kiuj legas ĝin ekde la maja numero de 2016, estas kontentaj pri la amplekso kaj diverseco de la temoj traktitaj dum tiuj dek jaroj, kaj pri la kvalito de la enhavo. Estas bona okazo por resumo kaj kundivido de kelkaj pensoj pri la revuo.

Granda gamo da temoj estas esploritaj en la revuo. Oni legas interalie pri ateistaj agadoj kaj luktoj, kredlibereco, persekutado de sendiuloj kaj alikredantoj, sekularismaj tendencoj, privilegiado kaj trudado de religio, proreligia subpremado de rajtoj, humanisma celebrado, la pandemio kaj religioj, kaj ankaŭ historiaj, filozofiaj kaj sciencaj temoj. Krome, aldoniĝas la ĉeftemaj demandoj, kiujn traktas la revuo ekde la numero de novembro 2020, je la mezpunkto de mia ĝisnune 10-jara redaktoreco. Vi la legantoj estas invitataj respondi al la demandoj. Ili certe plilarĝigas la temaron de la revuo.

Jen la demandoj ĝis nun: Kial vi fariĝis ateisto? Ĝis kiu grado vi kaŝas vian ateistecon? Ĉu la mondo estus pli paca sen religio? Ĉu ateisto povas / rajtas senti sin ano de religio? Ĝis kiu grado akcepteblas ofendi religiajn sentojn? Kion religiuloj povas lerni de ateistoj kaj inverse? Ĉu organizita religia varbado / konvertado ĝenas vin? Ĉu ateistoj bezonas liston de moralaj leĝoj? Kial oni malfidas ateistojn? Ĉu ateistoj aktivu en la protektado de religia libereco? Kaj por la nuna numero: Kion faru ateistoj pri la kreskanta agresemo en la mondo (aŭtoritatismo, ksenofobio, imperiismo, militagresado) – en kiuj ofte rolas religio?

Mi scias, ke la revuo estas grava elemento de nia asocia agado kaj la ĉefa konkreta aĵo, kiun la membroj ricevas kontraŭ siaj jaraj kotizoj. Krom havi la okazon legi gamon da espereble interesaj por ili artikoloj, ili povas mem kontribui al la revuo. Aldone, ATEO organizas kunvenojn ĉe UK-oj kaj rete, en kiuj aktive partoprenas pli da personoj ol normale kontribuas al revua numero. Fakte, ĉi-numere aperas longa artikolo pri niaj kunvenoj en 2025. Dum unu el tiuj, revua artikolo eĉ estis bazo por diskuto pri nia asocio kaj la dezirindeco fari ŝanĝojn. Rezulte de propono en alia ĉi-jara kunveno, la ĉeestantoj decidis starigi retpoŝtan diskut-grupon. Eble ni ankaŭ havu propran FB-paĝon. En kia ajn forumo, estus bone, se revuaj tekstoj povus esti diskutataj, prikomentataj. Tio ĝuste mankas nun – revuaj enhavoj iasence “subakviĝas” baldaŭ post sia apero, anstataŭ elvoki reagojn, komentojn, diskutojn.

Fine, revenante al kontribuado al la revuo, mi menciu, ke la numero, kiun vi nun legas, estis enhave realigita de nur kvin personoj, kaj duonon de la tekstoj kontribuis unu persono. Tiu lasta fakto estas aparte nekontentige kiam la persono estas la redaktoro mem! Nu, mi foje ne uzas ion senditan; tamen, vere, ĉi-foje alvenis iom maltro. Ĉiuokaze, bonan legadon! Kaj bonan verkadon por la venonta numero!

# ATEISTOJ EN AGRESA EPOKO

## Ĉu religio rolas en netoleremo, aŭtoritatismo, naciismo?

*Bert de Wit (Nederlando)*

Mia unua demando kompreneble estas: kio kaŭzas la kreskon de netoleremo, naciismo, aŭtoritatismo, k.s.? Mi pensas, ke ekzistas kelkaj kaŭzoj.

Unu el la kaŭzoj estas la nekredebla rapideco per kiu propagando kaj falsaj novaĵoj estas disvastigataj per la **interreto**. Jam en la komenco de la t.n. "sociaj komunikiloj" en la jaro 2009, mi, legante la kontribuojn de diversaj personoj pri tiu temo pensis: ĉi tie ne regas la prudento, ĉi tie regas nur antaŭjuĝoj, emoj insulti aliajn homojn. La sociaj komunikiloj estu pli ĝuste nomitaj kontraŭsociaj komunikiloj. Mi rifuzis partopreni en tiuj "sociaj komunikiloj". Nur poste mi eksciis kial tio okazis, nome ke estas la algoritmoj uzataj de la ret-platformoj, kiuj kaŭzas, ke homoj ricevas nur unuflankajn informojn kaj sin trovas en iu "bobelo", ne kapablaj pensi alimaniere. En antaŭaj tempoj oni parolis pri propagando, sed nuntempe oni ĉiam diras, ke temas pri la "libereco de sinesprimo", kiu fakte ne estas libereco.

Alia kaŭzo povas esti ke en ĉi tiu mondo homoj estas kvazaŭ devigataj, ankaŭ per tiuj "sociaj" komunikiloj, firmigi sian **identecon**. Identeco estas grava por sin distingi de aliaj personoj. Sed tiuj kiuj volas substreki sian identecon ne konscias, ke ili estas ofte tutsimple manipulataj. Estas kelkaj aŭtoroj nuntempaj, kiuj substrekas, ke la identeco de homo fakte respegulas la eksterajn postulojn kaj rilatojn kiujn oni havas (ekz. aŭstralia verkisto Alexander Douglas, aŭtoro de *Against Identity* [Kontraŭ Identeco]). Se oni fiere sin prezentas kiel ortodoksan religiulon aŭ ĝisostan liberpensulon aŭ aliseksemulon aŭ samseksemulon, virecan viron aŭ inan feministon, oni riskas malŝati aliajn homojn, kiuj ne estas tiaj. Religiuloj trovas pravigojn en la sanktaj libroj, nereligiuloj trovas pravigojn en kulturhistorio aŭ traktato pri la homaj rajtoj.

Pri **naciismo** jam verkis Eŭgeno Lanti pamfleton en la jaroj post la Unua Mondmilito. Li spertis la militon ne kiel soldato, sed kiel ambulanca helpanto de viktimoj. Li ekhavis la ideon, ke Esperanto estu uzata por malnaciigi la pensmanieron de homoj. Ke Esperanto estu la nura kulturlingvo. Zamenhof kreis Esperanton por ke homoj povu interkomunikiĝi sur neŭtrala fundamento, por tiel kreskigi reciprokan interkompreniĝon. Lanti pensis, ke tio ne sufiĉas kaj ke per unusola kulturlingvo "la laborista klaso" havu la eblon rekte komunikiĝi kun alilandanoj, tiel forigante sentojn de nacia supereco. Ni memoru, ke en la 19a jarcento ekzistis Internacioj Socialistaj, kiuj strebis al monda revolucio laŭ la ideoj de Marx. Marx mem estis



SAT-fondinto Eŭgeno Lanti (maldekstre) kaj verkisto George Orwell (Fonto: Wikimedia Commons)

germana judo, kiu fuĝis al Britio por daŭrigi sian verkadon. La germanaj socialdemokratoj estis insulte nomitaj “senpatriaj kamaradoj” de la regantoj en Prusio.

Estas interese, ke antaŭ kelka tempo oni reeldonis eseon pri naciismo de George Orwell. Eble kelkaj el vi scias, ke Orwell havis iajn rilatojn (per sia onklino) kun Lanti, kvankam ne tro varmajn. Kiam mi legis tiun eseon en nova vesto eldonitan, mi pensis ke eble siatempe, Lanti influis la pensadon de Orwell pri tiu temo.

Kiam oni rigardas la **religian karakteron** de naciismo, oni povas konstati, ke tio kelkfoje estas tre forta. Domela Nieuwenhuis (nederlanda anarkiisto) siatempe parolis pri la “piramido de tiranio”, en kiu la eklezio fakte ludis rolon. Ĉu estas ankoraŭ tiel? Estas ankaŭ nun ekzemploj de naciismo, kiuj fontas el iu religia fono. Pensu pri la t.n. evangeliaj kristanoj en Usono, kiuj forte subtenas Trump en lia projekto “Faru Usonon granda denove”. Sed aliflanke, tute ne necesas religio. Naciaj simboloj, la flago, la nacia himno jam sufiĉas kelkfoje por kreskigi iun senton de kohero. Kaj en monarkioj, la monarkoj ludas ligan rolon inter la homoj. Samkiel futbalherooj rolas en la batalo sur la futbalejo.

**Ateistoj** laŭ mi kontraŭu provojn de identecpolitiko kaj montru, ke tiuj identecoj, pri kiuj oni fieras, estas fakte konstruitaj kaj tute ne tiel apartaj. Kaj oni senvualigu la falsajn asertojn de naciistoj kaj identecpolitikistoj. En lernejoj la infanoj lernu pri aligentaj infanoj, lingvoj kaj kulturoj, kaj prefere ili kunlaboru kun aligentaj infanoj. Cetere, oni ne havu tro da iluzioj pri la efikoj de instruado kaj argumentado. Temas plejofte pri emocioj…

# Religio kaj agreso en la hodiaŭa mondo

*Bill Maxey (Usono)*

Religio povas roli diversmaniere – kaj ĉiam malutile – en nuntempaj agresaj agoj. Ĝi povas esti la ĉefa kaŭzo de intergrupa malakordo. Ĝi povas fariĝi faktoro en fenomenoj ne rekte ligitaj al religio, kiel interetnaj konfliktoj. En teokratiaj ŝtatoj, ĝi diktas la normojn por socia konduto. En oficiale sekularaj landoj, forta proreligia diskriminacio povas deveni eĉ de la registaro mem. En la interreto, malbonintencaj uzantoj de socikomunikiloj ruze misuzas religiajn temojn por veki malamon. La nuntempa situacio randas nekredeblon, kaj la fakto ke tiom da homoj senproteste alkutimiĝas al ĝi vere agacas kaj frustras min.

Historiaj kronikoj de mondaj civilizacioj rakontas pri multaj antagonismoj inter adeptoj de malsamaj kredaroj. Tiaj konfliktoj povas erupcii inter religioj aŭ inter sektoj de la sama konfesio. Bonŝance la malakordo plej ofte restas nur inter la kverelantaj grupoj kaj la problemoj solviĝas sen pli seriozaj sekvoj. Oni konsideru, ekzemple, la lastatempajn skismojn inter metodistoj en Usono kaj en la tutmonda anglikana komunumo rezulte de malsamaj personaj kredoj rilate al genro aŭ sekseco. Inter skismaj grupoj tamen foje reardiĝas akra batalemo, kiel inter la sunaistoj kaj ŝijaistoj en islamo.

Tamen eĉ al nia moderna “civilizita” mondo ne mankas eĉ senkompata buĉado nome de religiaj diferencoj, interalie en Niĝerio. Religio povas ankaŭ fariĝi potenca elemento en konfliktoj kiuj havas alian fonton. La plej furioza kaj longdaŭra batalado tamen okazas kiam kaj religiaj kaj etnaj faktoroj miksiĝas. Kiam religio rolas kiel parto de etna identeco, malfacilas apartigi la du. La kruela milito inter israelanoj kaj palestinanoj en Mez-Oriento kaj la feroca gentomurdo de la rohinĝa minoritato en Mjanmao atestas tion.

En alispecaj kazoj, registaroj arogas al si gravan rolon en religiaj aferoj. Ili povas devigi, favori aŭ malebligi religian agadon en sia lando. En teokratioj kiel Irano, Afganistano, Jemeno kaj Saud-Arabio, la registaro punas – ofte severe – siajn civitanojn kiuj ne fidele konformiĝas al la postuloj de la ŝtata religio aŭ kiuj apostatas aŭ blasfemas.

En oficiale sekularaj landoj, foje registaroj profitas fortan religian senton en sia socio por progresigi politikajn celojn timigajn kaj eĉ danĝerajn por tiuj kiuj ne apartenas al la favorata religio. La regantoj kaj iliaj subtenantoj senhonte privilegias specifan religion kaj trudas ĝin al la tuta ŝtato. Tiaj kampanjoj povas inkludi fortan naciisman konsistaĵon, kio helpas krei tre agreseman movadon, pretendante ke nur pli de la propra favorata religio savos la landon de ĉiuspecaj plagoj, kiel enmigrado, krimemaj bandoj aŭ maldekstruloj. Aparte maligna formo de registara manipulado de religio foje infektas la militistaron, kiam religiaj politikoj kaj fervoriga retoriko fariĝas kerna parto de ties trejnado.

Eĉ en la mondo de socikomunikiloj troviĝas multaj afiŝoj kiuj vekas malamon kaj agresemon kontraŭ celataj religiaj grupoj. Videoj, tekstoj, novaĵoj kaj aliaj allogaĵoj en la interreto elvokas

milionojn da komentoj, larĝe disvastigataj, kaj ofte mensogaj, troigaj aŭ eĉ klare provokaj. Ili povas ŝanĝi sintenojn kaj emigi homojn mistrakti anojn de kalumniataj religiaj aŭ etnaj grupoj. Eĉ murdoj – tro ofte amasaj – povas rezulti, kaj tiaj atencoj timigas aŭ teruras aliajn membrojn de tiuj komunumoj.

En aliaj cirkonstancoj, registaroj foje venĝe furiozas kontraŭ religio kaj ekzercas sian potencon por neniigi religian esprimadon. Ekzemple, en Nikaragvo, kie la romkatolikaj klerikoj apogis siajn paroĥanojn dum kontraŭregistaraj manifestacioj, la reĝimo Ortega-Murillo arbitre arestis, kondamnis kaj ekzilis pastrojn kaj episkopojn, foje eĉ revokante ilian civitanecon. Ĝi nuligis la juran statuson de religiaj organizaĵoj, konfiskis iliajn proprietaĵojn kaj malpermesis publikajn kultajn agadojn.

Religio do povas manifesti sin plurmaniere en nuntempaj agresaj agoj, ĝenerale kun nocaj efikoj. Rilate la plej sovaĝan bataladon, ordinaraj homoj povas fari malmulton, ĉar nek la militantoj nek la regantoj atentas eĉ fortan internacian kondamnon. Eblas tamen kontraŭbatali religion en aliaj roloj.

En landoj kie oni havas la liberon publike esprimi malaprobon de misuzo de religio kaj de religie motivitaj atakoj, ĉiu homo – ne nur ateistoj kaj aliaj senreligiuloj – kiu kontraŭas tian agresemon devus diskonigi laŭeble sian opozicion.

En ĉiuspecaj kontraŭregistaraj manifestacioj, videbligu per afiŝoj kaj publikaj paroladoj reziston al religia trudado kaj agresemo.

Verkemuloj publikigu leterojn kaj artikolojn, kiuj emfazas sekularismon kaj prezentas klarajn ekzemplojn de malbonintenca uzo de religio kaj la suferoj kiujn ĝi kaŭzas. Eĉ pli efike, oni preparu tekstojn por podkastoj aŭ videoj kaj kunlaboru kun aliaj por krei bonkvalitajn produktojn edukcele.

Tiuj kiuj aktivas en socikomunikilaj retoj laŭeble kontraŭbatalu mensogojn kaj malicajn alvokojn al diskriminacio kaj fiagoj kontraŭ religiaj minoritatoj kaj ateistoj.

Oni daŭre voĉdonu por enpostenigi nur reprezentantojn kiuj ĝisoste subtenas sekularismon, kaj restu en kontakto kun ili por atentigi ilin pri atencoj kaj por konigi propran vidpunkton.

Ni zorge eduku niajn proprajn familiojn por laŭeble ŝirmi ilin de la veneno de ksenofobiaj sintenoj kaj konvinkoj, speciale tiuj en la interreto.

Indas ankaŭ kompati ne nur la rektajn viktimojn de frakciigaj politikoj sed ankaŭ la persekutantojn, kiuj suferas alimaniere. La timo de “fremdaj” homoj kaj parencaj sentoj havas profundajn radikojn, kaj kunporti tiom da interna malamo certe kreas pezan psikan ŝarĝon. Eĉ pli bedaŭrinde, koŝmaraj memoroj dum jaroj turmentos junajn soldatojn ordonitajn mortigi senkulpajn homojn kaj senindulge detrui gravan infrastrukturon kaj necesajn vivrimedojn.

Ni restu firmaj en niaj kredoj pri la valoro de ĉiuj homoj kaj ne cedu fronte al tiuj agresaj trudoj. Aparte kiel esperantistoj, ni rigardu ĉiujn homojn kiel gefratojn. Ni ĝoju pro la diverseco de la mondo kaj kultivu toleremon, pacemon, kunsentemon kaj humilon. Niaj mensoj restu ĉiam malfermitaj sed daŭre skeptikaj.

Ni do laboru kaj esperu.

# Kreskanta ŝtata kaj socia agresemo kaj la sinteno de ateistoj

*Nyegosh Dube (Pollando)*

La unua afero atentiginda estas, ke ankaŭ ateistoj povus subteni unu aŭ pli el la diversaj formoj de agresemo listigitaj en la ĉeftema demando. Certe ekzistas aŭtoritatismaj, naciismaj, rasismaj, netoleremaj, imperiismaj, militagresemaj ateistoj. Manko de religia kredo ne ekskludas iujn el tiaj sentoj. EsperebIe inter ni Esperantistoj, speciale en ATEO, oni multe pli malofte renkontas tiajn ateistojn!

Tamen, konsidere la sufiĉe altan nivelon de subteno por Rusio inter Esperantistoj, oni povas pridubi la nivelon de pacamo kaj kontraŭimperiismo en nia movado – okcidentaj militismo kaj imperiismo estas malbonaj, sed ne rusiaj, ĉinaj aŭ aliaj neokcidentaj formoj. En Israelo troviĝas multaj sekularuloj, inkluzive de ateistoj; tamen multaj el ili subtenas la agreseman politikon de la Netanjahu-registaro rilate al Gazao – eble estas same inter sekularaj israelaj esperantistoj. Kvankam la Israel-Gazaa milito ne temas pri religio, tio ja estas granda faktoro en la konflikto: Hamas estas fundamentisma islama organizaĵo kaj aliflanke la israelaj registaro kaj parlamento enhavas fundamentistajn judojn.

La kresko de agresemo certe multe ŝuldas al la interreto kaj la malkresko kaj malfortiĝo de tradiciaj amaskomunikiloj kiel paperaj ĵurnaloj kaj naciaj elsendretoj (radiaj kaj televidaj). Nun ĉiu ajn povas disvastigi malam-instigajn opiniojn kaj "faktojn", konspir-teoriojn, senbazajn asertojn. Tradicia ĵurnalismo, kiu postulis zorgan esploradon de faktoj, kaj trairis redakcian kontrolon, restas nur ombro de sia antaŭa formo. Antaŭe, opinioj estis formitaj de influaj naciaj ĵurnaloj, gazetoj kaj elsendretoj. Kune kun tio, politikaj normoj falas grandskale – nun prezidantoj kaj aliaj politikistoj povas krude insulti homojn kaj tutajn grupojn, kaj demagoge instigi malamajn kaj perfortemajn emociojn. Trump, ripete malakceptante la rezultojn de la elektoj en 2020, efektive instigis atakon kontraŭ la usona leĝfarejo, la Kapitolo, fare de miloj de liaj subtenantoj. Kaj lastatempe li nomis la tutan somalan komunumon en Usono "rubaĵo".

Kompreneble, instigado de malamo ne estas nova afero – en la 1930aj jaroj, la nazioj uzis tradiciajn amaskomunikilojn por fari tion. Se aŭtoritatisma movado kaptas potencon kaj gajnas plenan superregadon de la amaskomunikilaro, kiel en Germanio en la lasta jarcento, ĝi ja povas facile instigi naciismon, rasismon, antisemitismon kaj imperiismon inter la civitanaro.

En Rusio hodiaŭ la Putin-reĝimo uzas religion kiel subtenilon por sia imperiisma, militisma politiko. Kvankam mi dubas ĉu Putin estas kredanto (li ja estis komunisto kaj agento de KGB), li uzas la Ortodoksan religion por siaj celoj. La patriarko de la Rusa Ortodoksa Eklezio forte subtenas la sangan politikon de la Putin-reĝimo kaj reciproke la reĝimo certigas al la Eklezio potencan pozicion en la socio. Iom simile, en Usono, Trump ŝajnigas esti fidela kristano kaj altiras la fervoran subtenon de multaj protestantoj kaj katolikoj, sed ankaŭ de multaj ortodoksaj judoj. Tamen, kontraste al antaŭaj prezidantoj, li tute ne vizitadas preĝejon dimanĉe – kaj eĉ ne metis sian manon sur la Biblio kiam li faris la

prezidantan oficĵuron ĉi-januare. Sed tio ne mallogas liajn religiajn admirantojn.

En Barato, la hindua religio ludas grandan rolon en la aŭtoritatisma politiko de la ĉefministro Modi. Li kaj lia partio, BJP, instigas malamon kontraŭ islamanoj, kaj provas forviŝi la spurojn de la islama Mogula dinastio, ŝanĝante stratnomojn, urbonomojn, detruante moskeojn el la Mogula periodo, ktp. En 2025, li lanĉis militon kontraŭ Pakistano post teror-atako celanta hinduojn kaj donis al sia militrespondo klaran hindu-religian motivon. En Brazilo, Jair Bolsonaro, dekstrula populisto, kiu laŭdadis la iamajn armeajn reĝimojn de Brazilo kaj aliaj sudamerikaj landoj, demagogie utiligis religion (kristanan) por gajni la subtenon de la granda religiularo de sia lando, precipe evangeliaj kristanoj. (Bolsonaro nun sidas en malliberejo kondamnite pro provo perforte regajni potencon post malvenko en elektoj.)

En Britio ĉi-jare okazis grandaj protestoj kontraŭ enmigrintoj, organizitaj de ekstrem-dekstruloj. En septembro eĉ 150 000 homoj protestis en Londono. La flago de Anglio (ruĝa kruco sur blanka fono) estis pendigita multloke tra la lando kaj fariĝis efektive naciisma, rasisma, ksenofobia simbolo. Oni ankaŭ pentris la flagon sur stratoj. Ankaŭ la brita flago estis pendigita aŭ pentrita kiel parto de la movado. La flagoj sendas klaran mesaĝon al enmigrintoj kaj neblankuloj en Britio: vi ne estas bonvenaj. Religio enmiksiĝas ĉefe en la formo de kontraŭ-islamismo – laŭ enketo de YouGov, 41% da britoj pensas, ke islamaj enmigrintoj havas negativan efikon sur la lando, dum tiel pensas nur 15% pri hinduoj kaj 14% pri sikoj.

Nu, do, kion faru ateistoj pri la kreskanta agresemo tutmonde? Kiel ili rilatu al la fenomenoj priskribitaj ĉi tie? Kiel ili sintenu al la kreskanta islamana loĝantaro de Eŭropo? En tiu lasta kazo aparte, oni ja paŝas sur delikata linio: inter islamofobio kaj subteno por sekularismo. Kiel mi menciis komence de la artikolo, ateistoj havas diversajn politikajn sintenojn kaj senreligieco neniel ekskludas agresemajn politikajn vidpunktojn. Tamen, oni esperus, ke la raciismo kaj humanismo, kiuj formas la bazon de ateisma mondrigardo, signifus kritikan aliron al agresema politiko celanta iujn grupojn aŭ najbarajn ŝtatojn. Nekredo en ĉiopotenca dio devus ankaŭ signifi malemon al aŭtoritatismo. Kaj ateistoj, estante minoritatoj en multaj landoj, devus esti sentemaj pli alispecaj minoritatoj.

Tiuj ateistoj, kiuj kontraŭas la diversajn formojn de agresemo, devus kuniĝi kun aliaj sampensuloj, inkluzive de religiuloj (kiam taŭgas), kaj agadi tiucele. Ateistoj devus esti portantoj de lumo en la nuntempa mallumo de militagresado, malam-instiga politikumado, subfosado de liberalaj kaj progresemaj valoroj, kaj kreskantaj rasismo kaj ksenofobio. Ateistoj ne kredas je la postvivo kaj paradizo, do ili devus strebi por ke la nuna reala vivo estu kiel eble plej bona por la plejeble granda nombro da homoj, laŭ la principo de la angla filozofo John Stuart Mill.

# ATEISTA AGADO

## ATEO-kunvenoj UK-aj kaj retaj instigis interesajn diskutojn



La publika ATEO-kunveno dum la UK en Burno

Ĉi-jare okazis kvin kunvenoj organizitaj de ATEO, du ĉe la UK en Burno, Ĉeĥio en julio, kaj tri virtualaj, unu en oktobro kaj du en decembro kadre de la Virtuala Kongreso (VK). En ĉiuj el ili, la partoprenantoj tre vigle engaĝiĝis, kio montras, ke nia asocio estas viva kaj aktiva.

**UK-aj kunvenoj**

En Burno, okazis du niaj kunvenoj sinsekve, la unua nur por membroj, la dua por la publiko, t.e. por la kongresanaro. En la fermita kunveno, la sekretario de la asocio, Anna Lowenstein, informis la membrojn ĉeestantajn pri la nuna membrar-nombro (nun jarfine ĝi staras je 56) kaj ankaŭ pri la ŝanĝo de la presad-loko de la revuo – de Italio al Pollando. Ŝi notis, ke Anna Skudlarska kaj Russ Williams plenumis la taskon tre rapide (tri tagoj por presado kaj ekspedado de la maja numero), kaj krome certigis tre altan pres-kvaliton. Anna ankaŭ raportis pri la financa stato de la asocio kaj pluraj malavaraj mondonacoj. Grandan dankon al la donacintoj!

Plejparte la fermita kunsido traktis du proponojn: 1) ke okazu pli da retaj kunsidoj por membroj de ATEO, kaj 2) ke oni starigu retajn grupojn, per kiuj la membroj de ATEO povus diskuti inter si. Ambaŭ proponoj estis entuziasme subtenataj. Roberto Garcia konsentis okupiĝi pri la retaj kunsidoj kunlabore kun alia estrarano Bill Maxey, kiu proponis la ideon. (Tio ja bone

plenumiĝis, kiel supre menciite.) Rilate al la dua propono estis iom da diskuto, ĉu membroj de ATEO havu diskutgrupon en Telegramo, ĉu prefere estu klasika retlisto por interŝanĝo de retmesaĝoj. Praktike la ĉeestantoj decidis fari ambaŭ. (Tamen, ĝis nun funkcias nur la grupo en "googlegroups.com" sed verŝajne tio sufiĉas.)

Se temas pri la publika kunveno en Burno, la ĉambro estis plena kaj okazis tre vigla, ampleksa diskuto: multaj ĉeestantoj esprimis siajn opiniojn. La temo estis: "Ĉu religio estas necesa en la hodiaŭa Eŭropo?" La revua redaktoro, Nyegosh Dube, enkondukis la temon, klarigante ke la demando baziĝis unuavice sur la kongreslando, kiu estas plejparte ateisma sed bonstata, kaj ankaŭ sur aliaj sufiĉe bonstataj eŭropaj landoj kun altaj niveloj de efektiva ateismo. Nesurprize, la plejmulto de la partoprenantoj kaj parolantoj estis senreligiuloj, sed ankaŭ aŭdiĝis la voĉoj de religiuloj, ĉiuj kiuj ŝajnis moderaj.

El la unua grupo venis la opinio, ke por ateistoj estas evidente, ke la respondo al la tema demando estas "Ne", sed religio estas parto de nacia identeco, ekz. la kroata identeco estas proksime ligita al katolikeco, kaj la serba al ortodokseco, kvankam en Norda Irlando religio perdis jam sian gravecon. Aldone oni atentigis, ke religio estas oportunisme uzata de politikistoj, ke la problemo estas ĉefe misuzo de religio kaj fanatikismo, kaj ke Dio estas drogo por religiuloj. Oni ankaŭ observis, ke multaj homoj simple bezonas religion, vizitas preĝejon por havi animan trankvilon. Siaflanke, religiuloj diris, ke religio estas necesa ĉar ĝi provizas valorojn, estas grava parto de nacia kulturo, helpas pri kreemo, aldonas magion al la vivo, helpas kontraŭagi solecon, kaj ke por ateistoj scienco estas religio. Rilate al tiu lasta, la ATEO-sekretario atentigis pri grava diferenco: scienco postulas pensadon kaj esploradon dum religio postulas obeadon al sanktaj tekstoj.

Dum la publika kunveno, la redaktoro legis mesaĝon de Wolfram Rohloff, protestanta pastro el Germanio, kiu subtenas dialogon kun ateistoj kaj volis respondi al la tema demando. Li ne povis partopreni ĉar li devis frue lasi la UK. Li diris, ke homaj rajtoj kaj valoroj ne estas aŭtonomaj, sed ligitaj kun Dio. Antaŭ la Dua Mondmilito, multaj sciencistoj en Eŭropo kaj Usono, plejparte nereligiaj, kredis en rasismaj teorioj kaj la naziaj rasleĝoj estis bazitaj sur sudusonaj. Se en Germanio homoj estus pli fidelaj al kristanismo en la frua 20a jarcento, eble oni evitus la nazian epokon. La ideo, ke homoj estas ĉiopotencaj kondukas al malbono – religio instruas, ke ekzistas pli potenca forto. Responde al lia mesaĝo, estis kelkaj rimarkigoj, interalie ke multe da diskriminaciado baziĝas sur religiaj kredoj, ke la homoj kiuj starigis la nazian reĝimon estis plejparte kristanoj, kaj ke oni povas uzi religion por iu ajn celo. Tamen iu ankaŭ komentis, ke se homoj sekvus religiajn idearojn, la mondo estus perfekta.

## Retaj kunvenoj

Por la oktobra retkunveno (por membroj), la estraro de ATEO elektis la temon "Ĉu nova identeco por nia asocio?", pri kiu aperis artikolo en la revuo (majo 2025), verkita de Bill Maxey. Jam antaŭ la kunveno venis proponoj por nomŝanĝoj, kiel ekzemple: Esperanta Humanista Asocio (EHA) kaj Humanista Esperanta Liberpensa Asocio (HELA). Ankaŭ por la revuo, ekz. *Humanismo Tutmonde*. Partoprenis ĉi-foje speciala gasto: Ralph Dumain, kiu fondis la asocion, kune kun John kaj Minerva Massen, en



La reta ATEO-kunveno por membroj en oktobro

1987. Li faris interesan kelkminutan paroladon.

Bill prezentis la temon menciante, ke liaj pensoj iom ŝanĝiĝis ekde kiam li verkis tiun artikolon. Laŭ li, estas grave plivigligi la asocion, plividebligi ĝin en la Esperanta movado, kaj allogi novajn membrojn (konsidere ke certe troviĝas pli ol kvindeko da Esperantistaj ateistoj). Li emfazis la neceson plilarĝigi nian vidkampon (ekz. la revuo traktu pli da temoj ligitaj kun Esperantaj idealoj kaj kulturaĵoj) kaj havi novajn fontojn de ideoj ĉerpitaj el nia Esperanta kulturo. Poste ni povus decidi ĉu ni sentas nin humanistoj kaj, se jes, eble tiam ni pripensu novan identecon kaj nomŝanĝon. Sekvis diskuto pri humanismo, ateismo, kaj nia identeco tiurilate. Jen diversaj opinioj: “ĉiuj Esperantistoj devus esti humanistoj”, “mi nomas min ateisto, ne humanisto”, “mi ne ŝatas la vorton ‘ateisto’”, “ne ĉiuj Esperantistoj estas humanistoj”, “ATEO estas tute bona nomo”, “mi estas ateisto, ne sendiulo”, “la vorto ‘ateismo’ estas negativa”, “ateismo estas pozitiva ideo”. Ĝenerale la sento estis, ke ni restu ATEO - ateisma asocio.

En sia parolado, Ralph rememoris, ke la fondintoj unuanime elektis la nomon ATEO, kaj ke la membraro voĉdonis favore al “Ateismo” kiel la revuo-nomo, kvankam li preferis ion alian, ekz. *Raciisma Revuo*. Li estis motivita kunfondi ATEO-n reage al la prezidanteco de Reagan kaj la dekstriĝo de Usono kaj pro la deziro fari ion praktikan *per* Esperanto. Li esprimis skeptikecon pri la ideo, ke ni filtru ateismon tra Esperantismo, kaj tiel provu fari nian asocion pli alloga, kvankam li agnoskis la historion de liberpensado en Esperantujo kaj la verkistojn, kiuj havis ateismajn, liberpensajn ideojn kiel William Auld.

En decembro, la unua VK-kunveno de ATEO okazis kiel parto de la Movada Foiro. Post prezento de la asocio kaj ĝiaj agadoj farita de nia sekretario Anna Lowenstein, ŝi kaj Brian Moon parolis pri la unua temo “Kial ATEO estis fondita?”. Anna diris, ke Ralph kaj la ges-roj Massen fondis ATEO-n reage al la kreskanta religia trudado en Usono fare de ekstremismaj grupoj dum la Reagan-epoko. Kaj Brian rememoris, ke Claude Nourmont refondis la asocion (kune kun Jesus de las Heras)

en 2000, rimarkinte ke la UK-kongresejoj donis impreson de religia foiro pro la multaj budoj de religiaj grupoj. La dua temo estis "Kial esti membro de ATEO?" al kiu respondis kelkaj ĉeestantaj membroj, dirante interalie, ke tiel eblas ligiĝi kaj diskuti kun aliaj ateistaj samideanoj kaj ke necesas kuniĝi por kontraŭbatali religian trudadon.

En la sekva VK-kunveno du tagojn poste, Bill Maxey prezentis la temon "De kie venis tiu mesaĝo?" rilate al la fontoj de religiaj kredoj. Li rimarkigis, ke spertuloj avertas nin ekkoni la fontojn de mesaĝoj kaj do religiuloj eble estu instigitaj esplori la fontojn de religiaj mesaĝoj. Tamen, kelkaj partoprenantoj observis, ke religiuloj simple fidas, ne pridubas la fontojn. Aliflanke, oni ankaŭ konstatis, ke modernaj kristanoj scias, ke la Biblio enhavas multajn mitojn kaj ke siaflanke religiuloj diras, ke ateistoj traktas la sciencan metodon kiel fidon. Notinte, ke religioj restos kun ni, Giridhar Rao, la prezidanto de ATEO, sugestis ke ni faru aliancojn kun religiaj grupoj por kune solvi problemojn, ekzemple tiujn ligitajn kun la vivmedio.

Partoprenis pli ol 30 personoj en ambaŭ el la du VK-kunvenoj.

*Artikolo verkita de la redakcio de* Ateismo.

## Monda Humanista Kongreso translokiĝas de Usono al Kanado

American Atheists, kunlaborante kun Humanists International kaj Humanist Canada, anoncis, ke la Monda Humanista Kongreso (World Humanist Congress) de 2026 ne plu okazos en Vaŝingtono, sed anstataŭe okazos en Otavo, Kanado, de la 7a ĝis la 9a de aŭgusto 2026.

La decido transloki la kongreson venis post detala taksado de la socia, politika kaj ekonomia medioj en Usono sub la nuna prezidenta administracio. Kreskanta kristannaciismo kaj administraciaj ordonoj, kiuj limigas la eniron de eksterlandaj vizitantoj, atakas la civilan socion, kaj difektas la protektadon de homaj rajtoj, kreis malfavoran etoson por internacia kunveno enradikiĝinta en la valoroj de sekularismo kaj inkluziveco.

"Humanistoj tra la tuta mondo maltrankviliĝas pro la pliakriĝo de religia naciismo kaj malplifortiĝo de protektoj por homaj rajtoj en Usono. Kiel stabila, inkluziva medio, kie homaj rajtoj estas subtenataj, Kanado permesos al ni okazigi eventon, kiu vere reflektas humanismajn valorojn", diris Gary McLelland, prezidanto de Humanists International.

"La neceso de ĉi tiu translokado spegulas profunde perturban realon", laŭ Nick Fish, prezidanto de American Atheists. "La nuna usona registaro fundamente kontraŭas la idealojn de plurismo, religia libereco kaj libera pensado. Ĝi damaĝas la reputacion de nia nacio eksterlande kaj malfortikigas la instituciojn kaj konstituciajn rajtojn, kiuj subtenas nian demokration ĉi tie hejme."

Pliaj detaloj (anglalingvaj) pri la kongreso haveblas ĉe:
www.worldhumanistcongress.org

*Anonco aperanta en la retejo www.atheists.org tradukita de la redakcio de* Ateismo *en mallongigita kaj iom modifita formo.*

# PENSOJ KAJ PERSPEKTIVOJ

## Aŭtoritato en religio: kial oni akceptas la fontojn de kredoj?

*Bill Maxey (Usono)*

Trevor Steele, en sia romano *Paŭlo Fondinto*, kreas intrigon surbaze de la larĝe akceptata aserto ke kristanismo ne nepre reprezentas la instruojn de Jesuo mem sed ilian interpretadon pere de la apostolo Paŭlo. Temas pri la judo Saŭlo de Tarso, kiu rakontis sian miraklan konvertiĝon al kristanismo sur la vojo al Damasko. Dek tri epistoloj laŭsupoze verkitaj de li al kristanaj komunumoj de la unua jarcento poste fariĝis kerna parto de la definitiva aro de nov-testamentaj tekstoj. Nuntempe ilia enhavo restas fundamenta al la kompreno de multaj kristanaj instruoj. Evidente kaj la fruaj kristanoj kaj la “patroj de la eklezio” ial akceptis la aŭtoritaton de Paŭlo – kiu ŝajne ne konis Jesuon persone – kaj ĝi restas valida hodiaŭ en multaj konfesioj.

Preskaŭ du mil jarojn poste, en nordorienta Usono, “profeto” Joseph Smith anoncis ke en sonĝo iu anĝelo malkaŝis al li la lokon de aro da oraj platoj sur kiuj troviĝas la historio de vizito de Jesuo al izraelidoj en Ameriko jarcentojn antaŭ lia apero en Mezoriento. Smith asertis ke li sukcesis traduki la “reformitan egiptan” lingvon de la tabuletoj en (malbonan) anglan de la elizabeta epoko pere de du specialaj ŝtonoj(!). Nesurprize, tute mankas fidindaj atestoj pri la ekzisto de tiuj oraĵoj. Malgraŭ tiu absurda rakonto, tamen, nova religio naskiĝis kaj, post seriozaj luktoj en siaj fruaj jardekoj, hodiaŭ mormonismo montras sin unu el la plej rapide kreskantaj (kaj monriĉaj) religioj en la mondo. Kial tiom da homoj akceptis la aŭtoritaton de tia ruzulo?

Ankaŭ aliaj, kiaj kristanscienco, atestantoj de Jehovo, kaj spiritismo, kies originoj simile suspektigas raciajn mensojn, havas milionojn da adeptoj. Ĉu homoj vere estas tiel kredemaj? Kial ili trovas la elpensaĵojn de homoj kiel Mary Baker Eddy, Joseph Franklin Rutherford kaj Allan Kardec kredindaj? Ĝuste ĉar ili supozas ke tiuj ideoj venas el aŭtoritata fonto. Sed kial ili pretas akcepti tiun aŭtoritaton?

En ĉiu epoko kaj socio troviĝas homoj – ŝamanoj, profetoj, psikaj klarviduloj, mediumoj, asketoj kaj diversspecaj “sanktuloj” – kiuj impresas aliajn kiel estaĵoj iel specialaj, nekutimaj, posedantaj unikajn povojn sen klara origino. Ofte kredemaj homoj imagas ian ligon inter ili kaj supernaturaj fortoj aŭ diaj figuroj. Pro tiaj supozitaj ligoj oni atribuas al ili aŭtoritaton kaj akceptas iliajn vortojn – ĉu skribajn, ĉu parolajn – kiel veraj kaj gravaj. Tiel naskiĝas kaj evoluas religioj.

Religioj fundamente konsistas el mesaĝoj kreitaj kaj dissenditaj de ordinaraj homoj kiuj ial sentas bezonon influi aliajn akcepti iliajn ideojn kaj fariĝi sekvantoj. Iliaj motivoj povas fonti interalie el mensaj difektoj, psikaj kompleksoj, trompemo aŭ malkontento kaj reformemo. Tiuj kiuj ricevas la mesaĝojn taksas ilin – plej ofte nur supraĵe – reagas, konsideras ilian taŭgecon kaj akceptas, ignoras aŭ rifuzas ilin. La decido dependas de la personaj bezonoj, sintenoj kaj kredemo de la ricevintoj.

La plej malnovaj religioj havas longan historion de diversaj proklamoj, asertoj, dogmoj, reguloj, postuloj k.s. faritaj de

teologoj kaj aliaj gravuloj en laŭgrade evoluinta hierarkio. Sed de kie venas la aŭtoritato de tiuj homoj kiuj faras la proklamojn kaj de la tekstoj kiujn ili sanktigas? Kial akcepti iliajn mesaĝojn kiel veraj kaj akceptendaj? Malgraŭ ilia granda influo kaj potenco, efektive temas pri nur ordinaraj homoj.

De tempo al tempo aliaj religioj naskiĝas ĝuste ĉar iu definitive refuzis iun el tiuj mesaĝoj, envortigas propran kritikon aŭ atentindan ideon kaj dissendas ĝin kun la celo persvadi aliajn homojn same kompreni kaj aliĝi al nova sekto. Nun nova aŭtoritatulo gajnas la lojalecon. Ankaŭ tiu trovos sekvantojn, kaj pro reformoj, skismoj, novaj guruoj kaj skoloj la religia pejzaĝo fariĝas iompostiome pli kompleksa kaj la lojaleco al aŭtoritatuloj ŝanĝiĝas.

La sensciaj homoj de pli fruaj epokoj estis naivaj, sed hodiaŭ ni ne havas tiun pretekston. Nuntempe scienco tre gravas. Por raciuloj, sciencistoj havas meritītan aŭtoritaton pro sia sindevontigo al rigoraj metodoj kaj preteco ŝanĝi siajn teoriojn se rezultoj indikas tiun neceson. Multaj sciencaj studoj pri la originoj kaj historioj de sanktigitaj tekstoj nun ekzistas. Oni povas legi esploraĵojn en psikologio, sociologio, neŭroscienco kaj antropologio kiuj montras kiel aŭtoritato funkcias en religio. Fakuloj en fiziko, terscienco, arkeologio kaj genetiko definitive pruvas la neeblecon de multaj religiaj rakontoj. Kredantoj tamen havas nenian intereson vere esplori racie la fontojn de siaj kredoj aŭ sia kredemo mem. Eĉ la multaj religiuloj kiuj fidas je scienco emas daŭre alkroĉi sin al aferoj el dubindaj fontoj – kaj do favori la malcertan aŭtoritaton de ties vortoj anstataŭ akcepti la rezultojn de sciencaj esploraĵoj de pruvitaj aŭtoritataj fakuloj.

Ni bone scias ke ege malfacilas persvadi religiulojn per racia argumentado ke iliaj kredoj estas eraraj. Sendube, esplori kaj lerni pli pri tio, kiel funkcias aŭtoritato en religio helpus al pli raciaj pensuloj – kiel ni – pli bone kompreni la reziston de religiuloj al serioza konsiderado de la fontoj de siaj kredoj kaj definitiva forlaso de ili.

En la virtuala ATEO-kunveno en oktobro, Ralph Dumain – unu el la kunfondintoj de nia asocio – asertis ke “la aŭtoritato de sanktaj tekstoj, de religioj, de insitucioj … estas nia malamiko”. Do tutcerte, pli bona kompreno pri tiu fenomeno helpos al ni trovi pli efikan sed malpli rektan manieron malfortigi la tenegon kiun religio havas sur kredemaj homoj kaj liberigi iliajn mensojn.

Ĉu inda celo por la nova jaro?



# Religia libereco kaj ateismo: nederlanda perspektivo

*Bert de Wit (Nederlando)*

**Tradicie: religia toleremo en la nordaj nederlandaj provincoj post 1568**

Por multaj nederlandanoj estas kutime strebi al libereco, ne nur religia libereco, sed ankaŭ rilate al seksa kaj genra liberecoj. La unua artikolo en la nederlanda konstitucio tekstas, ke neniu diskriminacio okazu rilate al sekso, religio aŭ aliaj temoj. Sed fakte, tiu artikolo datiĝas de la fino de la pasinta jarcento. En antaŭaj jarcentoj ne estis memkompreneble, ke ĉiu rajtas praktiki iun ajn religion, kiun tiu volas.

La nederlanda respubliko fondiĝis post la Okdekjara Milito (1568-1648) – ĝi estis rezulto de liberiga milito kontraŭ la habsburga regado. La batalo por la liberigo estis ligita al la batalo por protestantismo. Okazis ikondetruoj en preĝejoj en 1568. Estis precipe la reformisto Kalvino, kiu havis religian influon en la nederlandaj provincoj. Kiam en 1648, ĉe la Paco de Monastero (germane: *Münster*), la sendependeco de la sep nederlandaj provincoj estis agnoskita de la eksterlandaj potencoj, la vojo ŝajnis esti libera al protestanta regado, fare de la *stadhouder*, vicreĝo, kiu devenis el la familio Oranĝo-Nasaŭ.

La protestanta regado ne signifis, ke la katolikoj estis persekutataj, kiel okazis inverse en Francio (1572). Protestantaj urbaj registaroj permesis, ke katolikoj konservu sian religion. Ili povis ankaŭ sekrete celebri meson en t.n. kaŝitaj preĝejoj, kiel ekzemple Ons Lieve Heer op Solder (Nia Sinjoro en Mansardo) en Amsterdamo (vizitebla kiel muzeo nun). Ankaŭ menonitoj (protestanta branĉo) povis diservi en kaŝitaj preĝejoj.

La 17-jarcentaj nederlandaj provincoj forte dependis de komerco kaj tial ne



La kaŝita preĝejo “Nia Sinjoro en Mansardo” en Amsterdamo (bildmeze)  (Fonto: Arcam.nl)

volis ofendi homojn alilandajn pro religia rigoreco. La plejparto de la homoj tial toleris kunvivadon de homoj diversreligiaj en la lando. Oni akceptis en tiu tempo ne nur hugenotojn fuĝintajn el Francio (kiuj rajtis fondi siajn proprajn preĝejojn) sed ankaŭ judojn el la iberia duoninsulo (kiuj rajtis establi grandan sinagogon en Amsterdamo) kaj flandrajn protestantojn post la falo de Antverpeno en 1585.

## Tamen: ne nur religia toleremo, sed ankaŭ religia (aŭ ŝtata?) dogmemo

Dum la armistica periodo en la liberiga milito (ekde 1609) okazis aferoj kiuj pensigas pri religia rigoro. Okazis nome inter la protestantoj nederlandaj du gravaj disiĝaj tendencoj. Unu sekvis la pli liberecan doktrinon de la teologo Arminius, dum la dua sekvis la pli striktan, dogmeman doktrinon de la teologo Gomarus. Ĉi lasta estis vere kalvinisma kaj konvinkita pri la antaŭdestino de la homoj. La protagonistoj politikaj de tiuj du profesoroj estis respektive Johan van Oldenbarneveldt (ŝtatsekretario) kaj Princo Maurits (vicreĝo). Fakte, postaj historiistoj ne povis distingi inter la religia kaj politika karakteroj de la batalo inter la du. La kalvinistoj gajnis dum la Sinodo de Dordrecht en 1619, kaj Van Oldenbarneveldt estis senkapigita. La remonstrantoj, la adeptoj de Arminius, ne estis oficiale agnoskataj. Tamen tiu fakto ne malhelpis, ke en la nederlandaj urboj daŭre regis iu toleremo al aliaj religioj. Eĉ la plej dogmemaj kalvinistoj ŝatis paradi sian luksan vivstilon, kiun ili ĝuis dank' al la komerco.

## Ateistoj ne ŝatataj, sed tamen sin montris

Famkonata ĉe la judoj estis la "kazo" de la filozofo Spinoza, kiu kreskis en Amsterdamo, sed poste devis labori aliloke, ĉar li tro ribelis kontraŭ la ortodoksaj judaj dogmoj. En la sama periodo, vivis alia konata ateista figuro, sed ne juddevena, Adriaan Koerbagh, kiu estis radikala liberpensulo. Pro sia kritikado de la regantoj de la urbo Amsterdamo, oni kondamnis lin al 10-jara malliberigo. Post unu jaro tamen, li mortis. Oni povas diri, ke dank' al la religia libereco kaj la komerca spirito de la burĝoj, kiu instigis religian toleremon, ateismo povis ekaperi en la plej gravaj nederlandaj urboj.

## Religia diverseco oficiale agnoskata

Fakte, fine de la 18a jarcento, la religia diverseco estis pli kaj pli agnoskata oficiale. Kaj pro la napoleona okupado Nederlando ankaŭ konatiĝis pro sia apartigo de ŝtato kaj eklezio. Ekde la mezo de la 19a jarcento katolikoj oficiale povis fondi novajn preĝejojn kaj do ne plu devis kaŝe kunveni. Same rilate la ekleziojn de protestantaj minoritatoj. Ateistoj organiziĝis nur en la fino de la 19a jarcento kiel asocio por liberpensuloj. Unu el la plej konataj figuroj estis la ekspastoro Domela Nieuwenhuis, kiu fariĝis la unua parlamentano socialista. Li fakte estis anarkiisto. (Ekzistas libreto verkita de li, *La piramido de la tiranio*, eldonita de SAT-Broŝurservo.)

## Ĉu religia libereco estas ĉiam subteninda?

Oni povus konkludi, ke religia libereco ankaŭ prilaboras la kampon por ateismo. Sed, oni povas sin demandi, kiam oni konstatas la aĉaĵojn afiŝitajn en sociaj komunikiloj, ĉu entute religia libereco ĉiam kaj senkondiĉe subtenindas. Mi opinias klare, ke NE. Se religiaj gvidantoj aŭ ŝtataj gvidantoj atakas la liberecon de individuoj, kiuj

havas malsamajn opiniojn, tiam ili estu procesataj kiel kontraŭantoj de la unua artikolo de la konstitucio. Oni malebligu fakte tiajn eldirojn en la interreto. Sed oni konsciu, ke la firmao Meta vivtenas sin per tiaj atentokaptaj insultaj vortoj, kaj la algoritmoj servas tiun celon.

Libereco de sinesprimado miaopinie estas limigita per la libereco de aliaj personoj. Libereco neniam estas absoluta, sed relativa. “Kie la libereco de unu persono komenciĝas, la libereco de la aliulo finiĝas.” Lastatempe ni spertis, ke fakte religia ŝtato bombadas alian ŝtaton laŭdire ĉar ĝi persekutas alireligian malplimulton, kiu vere subtenis la antaŭan diktatoran reĝimon. Dume, tiu sama ŝtato etne “purigas” kaj genocidas. Religia libereco estas nur preteksto por potencpolitiko. Al mi naŭzas…



# De klerikara potenco al pli sekulareca regado en antikva Sumerio

*Nyegosh Dube (Pollando)*



La sumera urbo Ur en la 3a jarmilo a.K.E. kun sia granda templa komplekso

Estas konate, ke en antikvaj civilizoj kiel Mezopotamio kaj Egiptio, la homoj kredis je multeco de dioj, kaj religio ludis gravan rolon. Samtempe tamen, kaj eble surprize, tre frua formo de sekularismo ekkreskis kaj luktis kun la potenco de pastroj bazitaj en temploj. La rilato inter ŝtato kaj religio estas fakte antikva temo. En Mezopotamio, dum la fruaj jarcentoj de Sumerio*, la unua centro de civilizo, la temploj dominis la socion kaj la ĉefpastroj de la diversaj urbo-ŝtatoj estis efektive iliaj regantoj. La temploj ludis ne nur religian rolon sed ankaŭ gravan ekonomian rolon. Tamen dum la Frua Dinastia Periodo III (2600 – 2350 a.K.E.), la politika pejzaĝo transformiĝis kaj por la unua fojo troviĝis du gravaj centroj de potenco: la templo kaj la palaco.

Necesas klarigi, ke en tiu epoko ne ekzistis la ideo de ŝtato neŭtrala pri religio, aŭ de la apartigo de ŝtato kaj religio. Do “sekularismo” temas ne pri sendia regado sed pri palaca potenco kaj agado sendependaj de la klerikaro. Regantoj ĉiam asertis, ke ili regas per aŭtoritato donita de iu dio, kiun ili servas. Ne la popolo, sed la koncerna dio rajtigis ilin regi. Tamen, ili kredis, ke por daŭre havi tiun rajton, ili devus agi juste kaj zorgi pri la bonstato de sia popolo. Nu, ĝuste pro tio, venis

momento kiam sumera reganto, rimarkante kiel pastroj kaj aliaj potenculoj ekspluatas ordinarajn homojn, decidis agi kontraŭ ili.

## La roloj de temploj

Ni rigardu nun la religian kaj ekonomian rolojn de temploj. En ĉiu sumera urbo, ĝis la FDP III, la plej granda, plej grava strukturo estis la templo. Ĝiaj pastroj kaj oficistoj faris preskaŭ ĉion por funkciigi la lokan socion. La sumeroj kredis, ke homoj estis kreitaj por servi la diojn, kiuj regis la naturon kaj homajn vivojn kaj sociojn. La pastroj estis perantoj inter dioj kaj homoj. Ili interpretis la volon de la dioj kaj senĉese vivigis la kredon de la civitanoj je la dioj, kio certigis al la klerikoj altan, fortan pozicion. Ĉiutage ili plenumis diversajn ritojn kaj ceremoniojn kaj zorgis pri la dioj, kies statuoj troviĝis en la temploj, akceptante por ili manĝaĵojn kaj alispecajn donacojn. (Tio similas al diversaj nuntempaj religiaj kutimoj, speciale aziaj.) Kaj same kiel nuntempaj pastroj, ili solenis geedziĝojn kaj funebraĵojn.

Tamen, la rolo de temploj kaj iliaj pastroj en Sumerio estis multe pli vasta ol la plenumado de diversaj religiaj funkcioj. Kun la helpo de la templa burokrataro, la klerikoj administris grandajn bienojn, direktis la kamparan laboristaron sur templaj terenoj (kutime ĉirkaŭ triono de la tuta urbo-ŝtata teritorio) kaj mastrumis la irigaciajn sistemojn neprajn por terkultivado en tiu seka mondregiono. La templanoj kolektis la agrikulturaĵojn produktitajn de tiuj terlaboristoj kaj ankaŭ, kiel impostojn, parton de la rikoltoj de la ceteraj farmistoj. Ili zorgis ankaŭ pri la stokado de la kolektitaj grenoj, legomoj, fruktoj k.s. en templaj deponejoj kaj, tre grave, pri la distribuado de tiuj produktoj.

Sumerio ja prosperis pro siaj ĉiam kreskantaj agrikulturaj abundoj, kiuj ebligis la evoluigon de gamo da metioj kaj la produktadon de varoj. Fakte tiu produktado okazis grandparte en templaj laborejoj, kun la metiistoj subtenataj de la temploj, pagataj el la deponitaj manĝaĵoj. Oni interŝanĝis parton de tiuj varoj eksterlande por diversaj krudmaterialoj ne haveblaj en Sumerio, speciale konstruligno, metaloj kaj ŝtonoj. La temploj do havis gravan rolon ankaŭ en internacia komerco, kaj laboris por ili aro da negocistoj. Indas mencii, ke estis ĝuste la bezono registri ĉiujn tiujn ekonomiajn agojn (la kolektado kaj distribuado de grenoj, pagado de impostoj, komercado k.t.p.), kiu naskis la unuan skribsistemon. Skribistoj fariĝis tre respektata parto de la templanaro, kaj la sumera kojnoskribo disvastiĝis kaj estis uzata de multaj lingvoj dum tri jarmiloj.

## Pastra bonstato

Nesurprize, la pastroj bone zorgis pri siaj propraj bezonoj kaj komforto, havis sian propran aron da laboristoj kaj servistoj en la temploj, kaj certigis al si abundan porcion de la agrikulturaĵoj kolektitaj de la terkultivistoj. La pastroj kaj aliaj templanoj profitis krome de la oferoj portataj de kredantoj. La teologio funkciis jene: la dioj konsumis la spiritan esencon de la oferitaj manĝaĵoj, trinkaĵoj kaj aliaj donacoj, lasante la materialajn restaĵojn, t.e. la tutecon de la donacoj! Krome, oni devis pagi al pastroj por iliaj diversaj religiaj servoj. (Normale, oni pagis per aĵoj, kvankam ekzistis pra-mono en la formo de arĝentaj pecoj.) Kiel perantoj de la dioj, la pastroj havis rajton al tiuj bonaĵoj kaj aldone al la plena obeado de la civitanaro – nu, evidente enviinda posteno!



Reform-deklaraj konusoj de la reĝo Urukagina (Fonto: www.sumerianshakespeare.com)

## La kresko de neklerikaj fortoj

Kun la pligrandiĝo de sumeraj urboj, kreskis iliaj materialaj bezonoj, kio plimultigis konfliktojn inter la urbo-ŝtatoj pri terenoj kaj akvo-rajtoj. Samtempe la urboj fariĝis pli riĉaj kaj pli socie kompleksaj kaj ekformiĝis forta terposedanta aristokrataro, ĉiam pli sendependa de la klerikaro. Plejparte el tiu klaso ekaperis la *lugal*-oj ("grandaj viroj"), unue militestroj, kiuj arigis armeojn por batali kontraŭ aliaj sumeraj urbo-ŝtatoj kaj foje ankaŭ ekster-sumeraj invadantoj. La lugaloj fariĝis sekularecaj reĝoj – t.e. regantoj, kiuj ne apartenis al la klerikara elito – kaj konstruis palacojn, ofte apud temploj. Sekve, ekde tiam ekzistis la du centroj de potenco antaŭe menciitaj. Kvankam, unuflanke, ili havis simbiozan rilaton, aliflanke, ankaŭ ekzistis tensioj kaj konfliktoj inter la du. La ekonomiaj havaĵoj kaj la forteco de la netemplanoj kreskis, kaj la lugaloj transprenis impostadon, per kio ili financis publikajn projektojn kaj militojn.


La kresko de laika potenco tamen ne alportis pli bonan, pli justan socion, almenaŭ el la vidpunkto de ordinaraj neriĉaj civitanoj, ĉar la pastraro fariĝis

pli avidaj kaj koruptitaj kaj ĉar ankaŭ la ŝtatuloj kaj aristokratoj premis la senpotenculojn. Tion oni povas konstati pro la reformoj deklaritaj de Urukagina – lugalo de Lagaŝ, kiu regis ok jarojn (ĉirkaŭ 2378 – 2370 a.K.E.) – en siaj du famaj konusoj kovritaj de kojnoskribo. La unua priskribas la kondiĉojn (misuzado, mistraktado, koruptado), la dua la reformojn por kontraŭi ilin. La reformoj estis ducelaj, direktitaj kaj al la templaj kaj al la netemplaj potenculoj. La misuzoj ampleksis interalie forprenadon de terpecoj kaj aliaj propraĵoj de neriĉuloj fare de ambaŭ grupoj, altegajn prezojn por pastraj religiaj servoj, trudan postuladon de oferoj por temploj, nepravigeblajn aŭ ekscesajn impostojn, ŝuldosklavecon kaj pastran koruptiĝon. Do Urukagina enkondukis diversajn rimedojn por finigi tiujn misuzojn (ekz. ŝtata financado de funebraj ceremonioj) kaj krome por helpi kaj protekti malriĉulojn, orfojn, vidvinojn kaj maljunulojn.

**Konkludaj pensoj**

Sumerio ja estis brila civilizo, kiu pioniris kaj evoluigis multajn gravajn elementojn de civilizo mem, kiel urboj, lernejoj, skribado, matematiko, la rado kaj irigacio. Por funkciigi la socion kompreneble necesis iuspeca strukturo aŭ organizaĵo; dum multaj jarcentoj en Sumerio estis la temploj, kiuj provizis tion. Ili efektive funkciis kiel la komunumaj centroj, kiuj organizis agrikulturon, la produktadon de varoj, la distribuadon de grenoj k.t.p. kaj la laborfortojn necesajn por ĉi ĉio. Eblas admiri ilin tiurilate. Tamen la pastraro estas kritikinda (kiel en multaj aliaj socioj en diversaj epokoj) pro ekspluatado de la homa kredemo. Estis tro frue por la estiĝo de sekulara pensado (tio okazis en antikvaj Grekio kaj Barato du jarmilojn poste), sed almenaŭ aperis neklerikaj fortoj kaj regantoj kiel Urukagina, kiuj malpliigis klerikaran potencon.

**Mi uzas "Sumerio" kaj "sumero" anstataŭ la PIVa "Sumero" kaj "sumerano" ĉar la sumeroj estis klare distingebla popolo, kiu parolis lingvon ne parencan al iu ajn alia. Tio konformas al la Esperanta kutimo pri landnomoj, kiam temas pri lando de difinita etno, kiel Francujo/Francio kaj Japanujo/Japanio.*



# De kie venis tiu mesaĝo?

*Anna Lowenstein (Britio)*

Tiu mistera frazo estis la titolo de programero organizita de ATEO dum la ĉi-jara Virtuala Kongreso de UEA. La temo estis ligita kun la temo de la kongreso, kiu rilatis al teknologio kaj AI. Kompreneble nuntempe estas tre grave ĉiam zorge kontroli, kio estas la fonto de ricevitaj informoj. La celo de nia kunveno estis atentigi, ke tiu konstato devus aplikiĝi ankaŭ al religiaj mesaĝoj. Iuj homoj profunde kredas je ĉio skribita en religiaj tekstoj, tute ne esplorinte pri la origino de tiuj tekstoj.

Nia kunveno okazis en la sabato de la VK, kaj la postan matenon mi ricevis tre vivan ekzemplon de tiu senkritika akcepto de religia teksto. Dum la programo pri Virina Agado, Miora Raveloharison, estrarano de UEA kaj protestanta pastoro, parolis pri la kreado de virinoj laŭ la Biblio. Ŝi citis du tekstojn el Genezo:

1,27 Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.

2,22-3 Kaj Dio la Eternulo konstruis el la ripo, kiun Li prenis de la homo, virinon, kaj Li venigis ŝin al la homo. Kaj la homo diris: Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita.

Detale analizante la hebreajn vortojn, Miora klarigis, ke tio montras, ke virinoj estas egalaj al viroj, ĉar nenie en tiu teksto oni metas ilin en hierarĥion, sed male prezentas ilin tute egale. Tial laŭ la Biblio virino ne estas malsupera al viro. En la lastaj tri minutoj de la 20-minuta prezento ŝi ankaŭ menciis la modernan sciencan aliron, dirante, ke tio kompletigas la biblian klarigon kaj ne kontraŭstaras ĝin. Nenie en ŝia parolado aperis iu ajn sugesto, ke oni ne komprenu la biblian tekston laŭvorte.

Mi rimarkis, kiel eblas interpreti la biblian tekston por pruvi sian propran opinion. Dum la jarcentoj kompreneble oni povis uzi la fakton, ke virino estis farita el la ripo de la viro, por montri ke ŝi estas duaranga estaĵo. Se oni nuntempe havas alian opinion, per lerta analizado de la hebreaj vortoj, oni povas ankaŭ “pruvi” la malon. En sia fama libro *La iluzio Dio*, Richard Dawkins diskutas tion en ĉapitro kun la titolo “La ‘Bona’ Libro kaj la ŝanĝiĝanta morala etoso.” En tiu ĉapitro li atentigas, ke la plejmulto da homoj bazas siajn moralajn opiniojn ne sur sanktaj libroj sed sur la ideoj pri bono kaj malbono, kiuj regas ĝenerale en la propra socio. Poste ili pravigas siajn opiniojn per rakontoj kaj ekzemploj el la sanktaj libroj. Se iuj rakontoj en la sankta teksto ne akordiĝas kun la aktuala opinio (ekzemple se oni ne plu kredas, ke ĉiuj bestoj iam estis savitaj de Noaĥo per lia arkeo), oni klarigas, ke tiuj rakontoj estas nur “simbolaj”. Do, eĉ religiuloj fakte interpretas la tekstojn laŭ siaj jamaj opinioj, kaj ne inverse.

Invitite poste komenti pri la aŭditaj paroladoj, mi demandis min, ĉu komenti pri tiu parolado de Miora. Eble mi estus devinta sekvi la kutiman normon, kaj ĝentile silenti. Sed mi memorigis min pri la brita humura verkisto Douglas Adams, kiu iam demandis, kial oni devas akcepti la plej absurdajn agojn kaj asertojn de religiuloj, pro deziro ne ofendi[1]. Do, mi tamen komentis per pli-malpli la argumentoj, kiujn mi prezentis supre. Sendube tio estis vidata kiel malĝentila kaj ofenda ago, kaj mi ankoraŭ nun demandas min, ĉu mi prefere estus restinta en silento.

1 Mi atentigas tamen, ke kritiko pri la religiaj kutimoj de aliaj grupoj povas ankaŭ esti maniero por maski atakon kontraŭ malsekura malplimulto, ekzemple islamanoj en Eŭropo aŭ kristanoj en arabaj landoj.

# ĈIRKAŬ LA MONDO

## Kebekio plivastigas leĝon pri sekularismo

La kanada provinco Kebekio planas efektivigi limigojn pri publika preĝado kaj limigi la ekskluzivan proponadon de religiaj menuoj, kiel koŝeraj kaj halalaj manĝoj, en publikaj institucioj.

La plej novaj klopodoj plifortigi ŝtatan sekularismon, nomataj "sekularismo 2.0", estas parto de nova leĝprojekto enkondukita de la reganta Coalition Avenir Québec (Koalicio por la Estonteco de Kebekio) (CAQ), kiu instigis pasian debaton tra la tuta lando. Per tiu leĝprojekto oni celas plivastigi jam ekzistantan leĝon pri religiaj simboloj el 2019 (Leĝo 21). La originala leĝo malpermesas al juĝistoj, policistoj, instruistoj kaj oficistoj porti simbolojn kiel kipaon (judan ĉapeton), turbanon aŭ hiĝabon dum la laboro. Ĝi ankaŭ postulas, ke publikaj servoj estu provizataj kaj ricevataj kun la vizaĝo malkovrita. La Supera Kortumo de Kanado aŭdos juran kontraŭstaron al tiu leĝo komence de la venonta jaro.

Jean-François Roberge, la ministro respondeca pri sekularismo, diris en franclingva gazetara konferenco, ke la leĝprojekto "respektas individuajn kaj ankaŭ kolektivajn rajtojn". La proponitaj paŝoj en la leĝprojekto estus:

- etendi la malpermeson kontraŭ la portado de religiaj simboloj al dungitoj de subvenciitaj infanĝardenoj;
- malpermesi "kolektivajn religiajn praktikojn" kiel preĝado en publikaj spacoj kiel parkoj sen antaŭa rajtigo fare de municipoj;
- malpermesi al studentoj kaj dungitoj porti vizaĝkovrilojn en ĉiaj lernejoj ekde infanĝardeno supren.

Roberge diris, ke la limoj pri publika preĝado estis reago al lastatempaj protestoj en la provinco, kie okazis debato pri grupoj preĝantaj ĉe por-palestinaj manifestacioj. "Estas ŝoke vidi homojn bloki trafikon, preni posedon de publika spaco sen permeso, sen averto, kaj poste transformi niajn stratojn, niajn parkojn, niajn publikajn placojn en preĝejojn," li diris.

La decido plifortigi la leĝon jam instigis kritikon de la opozicia Parti Québecois (Partio Kebeka), kiu akuzis la CAQ pri kreado de dividoj por plifortigi subtenon antaŭ la provinca elekto de la venonta jaro. La Nacia Konsilio de Kanadaj Islamanoj ankaŭ kritikis la leĝprojekton, akuzante la CAQ pri "plifortigado de identecpolitiko kaj dividemo en panika provo reakiri la fidon de la publiko".

De kiam la Leĝo 21 estis aprobita antaŭ ses jaroj, la temo de sekularismo daŭre boletas en Kebekio. Pasintjare, 11 instruistoj – ĉefe de nordafrika deveno – en Montreala bazlernejo estis suspenditaj post kiam registara raporto konstatis, ke ili kreas toksan medion por lernantoj kaj dungitoj, kaj plejparte evitis iujn fakojn kiel sciencon kaj seksedukadon. La ĉefministro de Kebekio, Francois Legault, diris, ke la instruistoj provis enkonduki "islamismajn" kredojn, kaj li promesis plifortigi sekularismajn regulojn en lernejoj.

En aŭgusto, komitato starigita de la registaro publikigis raporton kun pluraj rekomendoj. Ili inkluzivis malpermeson kontraŭ religiaj simboloj por infanvartejaj laboristoj kaj la laŭgradan forigon de publika financado por privataj religiaj lernejoj. Kaj lastmonate, la registaro de Legault aprobis leĝon,



Kebeko, ĉefurbo de la kanada provinco Kebekio (Foto de: Jeffrey Isaac Greenberg)

kiu etendas la regulojn pri sekularismo al dungitoj, kiuj interagas kun lernantoj en publikaj bazlernejoj kaj mezlernejoj, kaj malpermesas al lernantoj porti vizaĝkovrilojn.

Por la Leĝo 21, la Kebekia registaro alvokis la "malgraŭo-paragrafon" – parton de la kanada konstitucio, kiu permesas al la registaro ignori la "fundamentajn liberecojn" de religio, esprimo kaj asociiĝo, same kiel la rajton al vivo, libereco kaj sekureco de la persono, kaj libereco kontraŭ diskriminacio. La Leĝo 21 ne mencias iun ajn specifan religion kaj rilatas al simboloj portataj de persono de iu ajn kredo, inkluzive de kristanoj, kaj konfirmas la religian neŭtralecon de la provinco.

Sed kritikantoj argumentas, ke ĝi celas plejparte religiajn malplimultojn, precipe virinojn de islama kredo. La leĝo alfrontis kelkajn jurajn defiojn en Kebekio. La Supera Kortumo de Kanado nun konsentis trakti la kazon, kiu dependos kaj de la leĝo mem kaj de la uzo de la malgraŭo-paragrafo.

La debato pri sekularismo – ĝenerale, la principo, ke religio kaj registaraj institucioj estu apartaj – ludas signifan rolon en la publika diskutado en la provinco de preskaŭ du jardekoj. Sekularismo estas grava valoro en la

kebekia socio ekde la 1960-aj jaroj, kiam la forta influo de la katolika eklezio komencis malkreski en la provinco. Enketo farita en septembro de la opinienketa firmao Leger, mendita de la amaskomunikiloj *Le Journal de Montréal* kaj TVA, indikis, ke 68% de la respondintoj opiniis, ke sekularismo estas grava valoro. En diversaj landoj en Eŭropa Unio troviĝas leĝoj similaj al la Leĝo 21. Ekzemple, Francio malpermesis vualojn, krucojn kaj aliajn religiajn simbolojn en lernejoj en 2004 kaj vizaĝkovrilojn en publikaj spacoj en 2010.

*Artikolo el BBC tradukita en iom modifita formo de la redakcio de* Ateismo.

## Komento pri Kebekio: ĉu sekularisma trudado?

*Anna Lowenstein (Britio)*

Leginte tiun artikolon kiel lingvokontrolanto de *Ateismo*, mi konfesas, ke mi ne nepre subtenas tiun elpaŝon de la kebekia registaro. Ni ateistoj protestas, kiam oni trudas al ni religiajn opiniojn kaj agojn. Ĉu ni ne faras same, kiam ni trudas sekularismon al religiuloj?

Por iuj judaj kaj siĥaj viroj (ne nepre por ĉiuj), la devigo kovri sian kapon estas religia postulo, ne afero de persona elekto. Se viro ĉiam volas eliri kun iu kapkovraĵo, kiel tio damaĝas aliajn homojn? Oni ne nepre devas konsenti kun tiu homo, sed se por li tiu afero estas ekstreme grava, kial malpermesi al li fari tion?

En Britujo oni decidis antaŭ 50 jaroj, ke siĥoj rajtas porti turbanon, se ili laboras en la aŭtobusa servo, anstataŭ la kaskedo de la uniformo. Eĉ en la armeo ili rajtas porti turbanon. Tio por ili estas ekstreme grava, esprimo de la propra identeco. Kial tio devus ĝeni aliajn homojn?

Iom pli komplika estas la kazo de virinoj, kiuj iras tra la mondo kun kovrita vizaĝo. Mi mem ne ŝatas vidi tion, sed laŭ mi ili estas plenkreskuloj, kiuj rajtas vesti sin laŭ la propra decido. Aliflanke, mi ja konsentas, ke ili ne laboru kun kovrita vizaĝo ekzemple en lernejoj kaj malsanulejoj. Tutsimple, tio estas tro for de la normoj de nia socio. Krome, tia vesto estas postulata ĉefe en socioj, en kiuj virinoj estas duarangaj civitanoj (kvankam ili mem kompreneble argumentas la malon). Tio ne estas esprimo de ilia propra identeco kiel la kapkovraĵoj de judaj kaj siĥaj viroj, sed simbolo de ilia subpremo en socioj, kiuj certe ne traktas ilin kiel egalulojn de viroj. Multaj virinoj en Irano tre klare anoncas, ke ili ne deziras kovri sian hararon, sed ili estas devigataj fari tion kontraŭ sia propra volo. Tial la simbola signifo de tiu kapkovraĵo estas tre klara, kaj fakte neakceptebla en nia socio.

# Refortigita strebo trudi katolikismon en polaj ŝtataj lernejoj

*Nyegosh Dube (Pollando)*

La pola parlamento (Sejmo) voĉdonis favore al leĝprojekto, kiu inside enkondukas devigan religian edukadon. Teorie, ĝi estos interŝanĝebla kun etiko, sed en la granda plimulto da lernejoj, etiko estas ankoraŭ instruata de kateĥizistoj. Laŭ la civitana movado Akcja Demokracja (Agado pri Demokratio), ĉi tiu leĝprojekto malantaŭenigas la sekularan karakteron de publikaj lernejoj je 100 jaroj. La projekto estis preparita de Ordo Iuris, superkonservativa neregistara organizaĵo kaj pensfabriko, kiu estas proksima al la Katolika Eklezio.

Ĝis nun ne estis devige por lernejanoj ĉeesti kursojn de religio (fakte katolikismo) – ili povis elekti etikon kiel alternativon aŭ neniun el la du, kvankam izoliĝo de lernejanoj estas ofta rezulto. Tamen, gepatroj devas speciale malelekti religion / etikon, alie lernejano estas devigata partopreni. La plejmulto da lernejanoj en Pollando ĉeestas la kursojn de religio, kvankam falas la nombro. La nuna registaro duonigis la instruadon de religio de du horoj al unu horo semajne, kaj krome forigis tiun studobjekton de la jarfina kalkulado de mezaj notoj, ambaŭ ŝanĝoj forte kritikataj de la Eklezio. La Eklezio emfazas, ke subteno por deviga religio estas la "voĉo de la pola socio", ĉar kvincent mil subskriboj estis kolektitaj por la leĝo verkita de Ordo Iuris. Tiu leĝprojekto revenigas la du horojn (sed ĉi-foje kiel devigajn) kaj necesigas la permeson de la loka episkopo, se iu lernejano aŭ ties gepatroj deziras redukton al unu horo!

La ĉefministro Donald Tusk kaj lia partio, la liberala KO, kontraŭstaras la leĝprojekton, sed ĝi sukcese trapasis la unuan etapon ĉar, krom ĉiuj opozicianoj, ankaŭ iuj parlamentanoj de la kvarpartia reganta koalicio voĉdonis por ĝi. Tiu koalicio malvenkigis la antaŭan dekstran registaron ligitan kun la Eklezio en 2023. Tiuj dekstruloj nun konsistigas la opozicion – kaj al ili aliĝis ĉiuj membroj de unu koalicia partio kaj iuj de alia koaliciano. Sejmaj komitatoj nuntempe laboras pri la leĝprojekto kaj supozeble oni denove voĉdonos pri ĝi.

Laŭ la vicministro por edukado Katarzyna Lubnauer (KO-membro, kiu publike deklaris, ke ŝi estas ateisto), “Ĉi tiu leĝo malrespektas la principojn de la ideologia neŭtraleco de la ŝtato kaj limigas la konstitucian rajton de gepatroj eduki siajn infanojn laŭ siaj propraj kredoj. Polaj lernejoj devus esti loko, kie ĉiu infano — kredanta kaj nekredanta, praktikanta kaj nepraktikanta — sentas sin bone.“

Akcja Demokracja lanĉis petskribon por kontraŭi la leĝproponon. Ĝi argumentas, ke la propono kontraŭas la Konstitucion kaj iras eĉ pli foren ol la Konkordato (interkonsento kun la Vatikano subskribita en 1993), enkondukante devigan religian edukadon en lernejoj kaj antaŭlernejoj. La petskribo emfazas, ke la Respubliko de Pollando estas konstituita kiel laika ŝtato, neŭtrala rilate al religio kaj kredo, kaj ke publikaj lernejoj devus esti laikaj laŭ naturo, kaj religia edukado devus resti libervola fako. Krome ĝi atentigas, ke kursoj de religio en sia nuna formo jam estas iloj por antaŭenigi la politikan tagordon de fundamentistoj kaj la ekstrema dekstro. Bedaŭrinde, ĝis nun la petskribo ne gajnis multajn subskribojn malgraŭ la fakto, ke la plejmulto da poloj subtenas sekularismon.

*Teksto preparita de la redakcio de* Ateismo *surbaze de: petskribo de Akcja Demokracja, artikolo aperinta en la anglalingva retejo Notes from Poland (27.09.2025), kaj artikolo en la anglalingva Vikipedio.*

# Eŭtanazio kaj kruela religia altrudo en Hispanio

*Ricardo Biurrun (Hispanio)*

Lastatempe oni vidas ĝenan ekzemplon de agresa kristanisma agado en Hispanio. Tiu agado estas farata de ekstremdekstra profesia asocio “Abogados Cristianos” (Kristanaj Advokatoj), sed ili bazas sian agadon sur katolika kristanismo pli ol sur sia politika sinteno.

Plenkreska virino, tute konscia, trafita de eta mensa malsano, kiun la juĝistoj taksas kiel ne malkapabligan (“personeca lima perturbo”) petis, ke oni permesu al ŝi atingi la “bonan morton”, tial ke ŝiaj fizikaj malsanoj estas nekuraceblaj kaj premas ŝin per fortaj doloroj.

Eŭtanazio por ŝi estis aprobita unuanime de komisiono de 19 profesiuloj en julio 2024, sed ŝia patro (reprezentata de Kristanaj Advokatoj) apelaciis, kaj tio suspendis en aŭgusto la efikon de la antaŭa decido. Ok monatojn poste (la juĝejoj estas ŝtopitaj de dosieroj) la juĝisto verdiktis pri du malsamaj temoj:

- Ĉu patro rajtas apelacii decidon de sia filino pri ŝia vivo? Juĝisto konkludis, ke Ne: la virino estas plenaĝa kaj neniu pruvis, ke ŝia mensa malsano malkapabligas ŝin.

- Ĉu la malsana virino faris la decidon en stabila maniero? La kristanoj montris leteron de ŝi, laŭ kiu ŝi dubetis pri tio. Sed oni pruvis, ke tiu letero estis subskribita en hospitalo, kun ŝia ĉambro invadita de kristana grupo kaj sub analgezio. Juĝisto konkludis, ke tiu letero ne validas.

La patro kaj liaj Kristanaj Advokatoj apelaciis, kaj denove oni devis atendi en vico por ke la alta kortumo de la regiono Katalunio studu la aferon kaj faru decidon. Tio okazis en septembro 2025. La kortumo agnoskis, ke la leĝaj kondiĉoj por eŭtanazio estas ĉi-kaze plenumitaj, sed tiuj juĝistoj samtempe agnoskis, ke la patro rajtas interveni kaj do permesis al li denove apelacii kaj porti la dosieron al la plej alta tribunalo de la ŝtato (“Tribunal Supremo”), kaj post tio, al eŭrop-unia kortumo. Trafite de senĉesaj doloroj kaj estante en senespera sanstato, la virino devas atendi… ĉar la dio de la katolikoj devigas al religiuloj malhelpi eŭtanazion: nur tiu kruela ne-estaĵo rajtas fini la homan vivon.

# ATEISMO

## ENHAVO


| | |
|---|---|
| **VORTO DE LA REDAKTORO** | 2 |
| | |
| **ĈEFTEMO: ATEISTOJ EN AGRESA EPOKO** | |
| Ĉu religio rolas en netoleremo, aŭtoritatismo, naciismo? | 3 |
| Religio kaj agreso en la hodiaŭa mondo | 5 |
| Kreskanta ŝtata kaj socia agresemo kaj la sinteno de ateistoj | 7 |
| | |
| **ATEISTA AGADO** | |
| ATEO-kunvenoj UK-aj kaj retaj instigis interesajn diskutojn | 9 |
| Monda Humanista Kongreso translokiĝas de Usono al Kanado | 12 |
| | |
| **PENSOJ KAJ PERSPEKTIVOJ** | |
| Aŭtoritato en religio: kial oni akceptas la fontojn de kredoj? | 13 |
| Religia libereco kaj ateismo: nederlanda perspektivo | 15 |
| De klerikara potenco al pli sekulareca regado en antikva Sumerio | 18 |
| De kie venis tiu mesaĝo? | 22 |
| | |
| **ĈIRKAŬ LA MONDO** | |
| Kebekio plivastigas leĝon pri sekularismo | 23 |
| Komento pri Kebekio: ĉu sekularisma trudado? | 25 |
| Refortigita strebo trudi katolikismon en polaj ŝtataj lernejoj | 26 |
| Eŭtanazio kaj kruela religia altrudo en Hispanio | 27 |



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org

Prezidanto: Giridhar Rao (Barato)
Sekretario: Anna Lowenstein (Britio), Kasisto: Dieter Rooke (Svislando)
Redaktoro: Nyegosh Dube (Pollando), Grafikisto: John Greenwood (Britio)
Lingva kontrolo: Bill Maxey (Usono), Anna Lowenstein (Britio)
La Estraro de ATEO ampleksas ĉiujn listigitajn ĉi-supre
kune kun Roberto Garcia (Britio)

Jarkotizo (kun reta revuo): €13 (A-landoj) / €10 (B-landoj) / €6 (Afriko)
Jarkotizo (kun papera revuo): €16 (A-landoj) / €13 (B-landoj kaj Afriko)
Konto: **ateo-y** ĉe UEA